

# KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO II<sup>a</sup> : JANUARO 1922

# KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

Jarkotizo : 5 Pesetoj

## CLAU ESPERANTO

(KATALUNA ŜLOSILO)

reeldonita de K. E. F.

Verdaj kovriloj kun nova propaganda teksto pri la lastaj venkoj de Esperanto.

100 EKZEMPLEROJ

KOSTAS 7'50 PTOJN.

Vin turnu al nia Administristo.

## Gvidlibro de Girona

VERKITA DE JOSEP MARIA DALMAU

KAJ

ELDONITA DE «ĜERONA ESPERO»

OKAZE DE LA

IX<sup>a</sup> KONGRESO DE «KATALUNA  
ESPERANTISTA FEDERACIO»

Kun belegaj gravuraĵoj kaj detala arĥeologia kaj historia priskribo de la urbo. — Ĉiuspecaj sciigoj.

PREZO : 1 peseto.

## ESPERANTO TRIUMFONTA

Jurnalo internacia, universala, sendependa. Aperas regule ĉiusemajne en granda gazet-formato.

Teksto nur en Esperanto.

Aĉetebla ĉe kioskoj en Barcelona kaj Girona.

Petu specimenaĵn numerojn de la eldonanto TEO JUNG - Köln-Horrem (Germanujo).

## “L'ESPERANTO”

MONATA ILUSTRITA

INTERNACIA REVUO

sub patronado de

«ITALA KATEDRO DE ESPERANTO»

Abono : 15 lirojn

Adreso :

S. VITO AL TAGLIAMENTO

(Italujo)



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

**Kataluna Esperantista Federacio**

Redakcio kaj Administraĉio :

Carme, 30 : BARCELONA

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

---

**Redaktoro : Jaume Grau Casas**

---

FELIĈAN JARON 1922

AL LA MEMBROJ DE

**KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO**

KAJ AL LA

TUTMONDA SAMIDEANARO

DEZIRAS

**LA KOMITATO**

## L'Esperanto i la Societat de les Nacions

(Traduim aquest article, publicat en esperanto i en francès, de la revista «Franca Esperantisto», orgue de la Societat Francesa per a la propagació de l'Esperanto).



NS plau de poder reproduir a continuació, al començament d'aquest quadern, que ha d'ésser dedicat a la ressenya del Congrés Esperantista Universal de Praga, dos interessants extractes del *Diari de la Societat de les Nacions*. Aquests extractes donen a conèixer el gran èxit assolit per l'Esperanto davant la Segona Assemblea de la Societat de les Nacions, al qual han contribuït fortament les brillants manifestacions d'aquest Congrés.

Devem fer notar, en primer termè, que la proposició, que no portava al començament més que 11 signatures, en porta avui 2 més de nous membres, entre ells el delegat polonès. Cal remarcar la reserva feta per aquest, de que «ell enten per llengua internacional una llengua auxiliar pràctica, que de cap manera atempti al prestigi secular de la llengua francesa com a llengua diplomàtica internacional». Aquesta reserva aporta als Esperantistes francesos un preciós apoi, car és la mateixa tesi que ells sostenen proposant l'adopció de l'Esperanto com a llengua *auxiliar* pel servei de la Societat de les Nacions.

Segueix després dels dos extractes la reproducció de la circular adreçada per la «Societat d'Amics de l'Esperanto» a les Lligues nacionals per a la Societat de les Nacions, amb el fi de facilitar l'organització d'aquestes manifestacions a Praga.

Hi afegim finalment el text del raport n.º 253, del 17 de Desembre 1920, presentat a la Primera Assemblea pel Senador belga Sr. Lafontaine, en nom de la Segona Comissió nomenada per a l'examen de la qüestió de la llengua internacional, i del qual és feta menció al final del segon extracte reproduït.

Esperem poder publicar també més endavant el raport del Sots-Secretari General de la Societat de les Nacions, que menciona el mateix extracte, junt amb els raports redactats sobre el Congrés de Praga pels delegats enviats al Congrés per la «Oficina internacional de Treball de la Societat de les Nacions» i per la «Unió internacional de les Societats de la Creu Roja».

**Diari de la Segona Assemblea de la Societat de les Nacions**  
(Ginebra 1921)

10<sup>a</sup> SESSIÓ PLENÀRIA

SALA DE LA REFORMACIÓ

*Dimarts, 13 Setembre 1921, a les 10*

**Moció sobre l'ensenyament de l'Esperanto**

El President dóna lectura a l'Assemblea d'una comunicació relativa a l'ensenyament de l'Esperanto i signada per:

Lord Robert Cecil (Àfrica del Sud);

Sr. Jonesco (Rumania);

L'Emir Zoka-ed-Dowleh (Pèrsia);

Sr. Lafontaine (Bèlgica);

Sr. Benès (Txeco-Eslovàquia);

Sr. Restrepo (Colòmbia);

Sr. Tang-Tsai-Fou (Xina);

Sr. Enckell (Finlàndia);

Mgr. Fan S. Noli (Albània);

Sr. Adatci (Japó);

Sr. Escalante (Veneçuela);

El Maharajah Knengarji (Índia).

Dita comunicació proposa que el raport de la Segona Comissió de la Primera Assemblea referent a una llengua internacional, d'una banda, i de l'altra, el raport del Sots-Secretari General sobre la seva missió oficial al Congrés Universal d'Esperanto tingut a Praga pel mes d'Agost darrer, siguin presentats a la Segona Assemblea. Proposa, demés, que la Segona Assemblea posi a votació una recomanació relativa a l'ús d'una llengua internacional, i que per a això sigui usat el text de la recomanació presentada l'any darrer a la Primera Assemblea. El text oficial de la recomanació presentada a l'Assemblea l'any darrer és el següent:

«La Societat de les Nacions, constatant les dificultats lingüístiques que barren les relacions directes entre els pobles i la urgent necessitat de posar-hi remei per a ajudar a la bona harmonia de les Nacions.

«Segueix amb interès els assaigs d'ensenyament oficial de la llengua internacional Esperanto en les Escoles públiques de varis membres de la Societat.

«Expressa el desig que el Secretariat General prepari, per a la

pròxima Assemblea, un raport sobre els resultats obtinguts en aquest terreny.»

La comunicació llegida pel President porta també la signatura del Sr. Askenazy (Polònia), amb la reserva següent:

«Entenent per llengua internacional un llenguatge pràctic auxiliar que no atempti en res al dret i al prestigi secular de la llengua francesa com a llengua diplomàtica internacional.»

#### **Decisió adoptada per la Comissió especial per a l'estudi de la proposta relativa a l'ensenyament de l'Esperanto en les escoles**

La Comissió especial, encarregada d'examinar les propostes presentades a l'Assemblea, s'ha assabentat de la petició feta per 13 membres per a recomanar l'introducció de la llengua auxiliar internacional Esperanto en les escoles públiques, a fi de facilitar la recta intercomprensió dels pobles del món enter.

La Comissió opina que aquest problema, pel que s'interessen un nombre cada dia més gran d'Estats, mereix ésser profundament estudiat abans de que sigui discutit per l'Assemblea. Una Comissió n'ha estat ja encarregada l'any darrer i ha presentat un breu raport recomanant una enquesta del Secretariat General sobre les experiències ja tingudes i sobre els resultats assolits en el terreny dels fets.

Proposem que la qüestió sigui inclosa en l'ordre del dia de la pròxima Assemblea, i que el Secretari General prepari des d'ara un raport complet i documentat en el sentit indicat pel projecte de resolució.

Segons el desig dels signataris, el raport de la Comissió 2 (1) i el raport del Sots-Secretari General sobre la seva missió al Congrés de Praga seran comunicats als membres de la Societat sens altre ajornament.

Acord de l'Assemblea, matí del 15 Setembre 1921.

SOCIETAT  
DELS  
AMICS DE L'ESPERANTO

51, rue de Clichy

PARIS

*Els Membres del Consell de la Societat  
dels Amics de l'Esperanto al Senyor Pre-  
sident de la Lliga Nacional per a la Societat de les Nacions, a . . . . .*

Senyor President,

Els tràgics esdeveniments dels darrers anys, que tan sovint i de la manera més inesperada han aproximat homes de diverses nacionalitats i de

(1) Document 253 (17 Desembre 1920).

totes condicions socials, han fet més palesa la necessitat de dotar l'Humanitat d'una llengua internacional auxiliar, susceptible d'assegurar l'intercomprensió dels homes de tots els països, que parlen diferents llengües maternes.

La creació de la Societat de les Nacions, que fa indispensable la comunicació mundial de documents destinats a ésser compresos per tothom torna d'urgent actualitat aquesta qüestió i deu per tant conduir tots els que s'interessen en aquesta creació a la introducció immediata d'una llengua d'aquesta mena, si això és possible.

En efecte, aquesta llengua internacional existeix i és coneguda i parlada ja, a totes les parts del món, per un nombre considerable d'adeptes.

Es aquesta la llengua Esperanto, creada fa més de 30 anys, fàcil d'aprendre per tothom en poc temps, parlada de la mateixa manera en tots els països, que s'ha difos poc a poc per tot arreu per la sola potència de ses pròpies qualitats, malgrat l'indiferència i àdhuc l'hostilitat de les classes dirigents. Ella ha penetrat especialment en els medis populars, en els quals, més que enlloc, se sent la necessitat d'adquirir, sense dificultats econòmiques, un mitjà de comunicació amb els estrangers.

La llengua Esperanto té ja una rica i abundant literatura, que s'extén als temes més variats. Posseeix orgues de publicació periòdica que permeten, en tots els països, posar-la al servei de la Societat de les Nacions.

Els èxits d'aquesta llengua han suscitat l'aparició de llengües concurrents, que tenen, com és de suposar, la pretensió d'ésser-li superiors, mes la creixent difusió de l'Esperanto, malgrat els esforços dels preconitzadors d'altres projectes, ha mostrat la seva incontestable superioritat i li ha assegurat el manteniment de la situació adquirida amb la força dels fets.

Ella és doncs la sola realment capaç d'esdevenir la llengua *auxiliar* que la Societat de Nacions necessita, al costat de la llengua *oficial* que dita Societat ha d'usar en la publicació dels seus documents autèntics

Declaracions fetes an aquest fi en els últims temps, per autoritats competents, han tingut, com a consagració, el vot formulat pel Congrés mundial de les Associacions internacionals, reunit a Bruseles pel mes de setembre darrer.

Aquestes declaracions han contribuït també a la redacció del favorable Raport presentat a l'Assemblea de la Societat de les Nacions, a Ginebra, pel Desembre 1920, sobre el projecte de resolució proposat per un cert nombre de delegats assistents a l'Assemblea, i a que fos presa en consideració igualment aquesta qüestió per la Conferència internacional de la Creu Roja, per l'Abril de 1921.

Aquestes manifestacions mostren, com ho ha reconegut el Congrés mundial de Bruseles, que és convenient que tots els homes convençuts de la necessitat de l'adopció d'una llengua internacional auxiliar comú s'adhereixin al moviment esperantista, ajornant tots els projectes de millorament de la llengua Esperanto fins el moment d'ésser adoptada oficialment i introduïda en l'ensenyament de tots els països.





bert Cecil (Àfrica del Sud); Sr. Schanzer (Itàlia); El Jam de Nawanager (Índia); Sr. Benès (Txeco-Eslovàquia); Emir Zoka-ed-Dowleh (Pèrsia).

La Comissió s'ha trobat d'acord amb els signataris per a constatar les greus dificultats lingüístiques que impedeixen les relacions directes entre els pobles i per a desitjar l'ensenyament, en totes les escoles del món, d'una llengua internacional, fàcil i simple, que apendrien els infants al costat de llur llengua materna i que serviria a les futures generacions de mitjà general de comunicació internacional. No obstant, la Comissió estima que fóra bo de procedir per endavant a una enquesta apoiant-se sobre el terreny dels fets.

La Comissió s'ha enterat amb interès que el Congrés mundial de les Associacions Internacionals, reunit a Bruseles, en setembre darrer, ha pogut constatar l'unanimitat dels partidaris d'una llengua internacional sobre l'ensenyament de l'Esperanto, i que el Congrés ha recomanat a tots els que s'interessen en aquesta qüestió de posar-se d'acord per a trobar prompte una solució pràctica.

S'ha enterat igualment per boca dels representants de la Pèrsia i de la Xina a la Societat de les Nacions, que un vast moviment popular comença de mostrar-se a l'Àsia en el mateix sentit, ensems que altres varis Estats membres de la Societat, com el Brasil i Txeco-Eslovàquia, han introduït ja aquest ensenyament en les escoles públiques.

El mateix han fet algunes municipalitats d'Anglaterra i d'Itàlia.

Finalment la Comissió s'ha informat que aquesta llengua internacional auxiliar ha estat empleada amb èxit en varis grans congressos universals, durant els quals els oradors de tots els països s'han comprès fàcilment i els debats han pogut desenrotllar-se del principi a la fi en una mateixa llengua, posant tots els oradors en situació de la més completa igualtat. No obstant la Comissió ha pensat que aquest afer és de competència de l'Assemblea i que calia suprimir un paràgraf de la proposició que li havia estat sotmesa i transformar-lo en un simple vot, que mostrés al Secretariat General l'oportunitat de procedir a una enquesta per a fer veure clarament a la pròxima Assemblea els resultats obtinguts en aquest terreny.

Vetaquí el text del vot que la Comissió us proposa d'emetre per majoria:

«La Societat de les Nacions, constatant les dificultats lingüístiques que barren les relacions directes entre els pobles i la urgent necessitat de posar-hi remei per a ajudar a la bona harmonia de les Nacions.

«Segueix amb interès els assaigs d'ensenyament oficial de la llengua internacional Esperanto en les Escoles públiques de varis membres de la Societat.

«Expressa el desig que el Secretariat General prepari, per a la pròxima Assemblea, un raport sobre els resultats obtinguts en aquest terreny».

## La romano de Mende Narr (Mende la Malspritulo)

(El la vivo en malgranda Hebrea urbo en Orienta Eŭropo)

**R**VANKAM la urbeto Mszczonow estis nur malgranda kaj ĉiu enloĝanto de la urbo konis ĉiun alian loĝanton, Mende Narr estis kvazaŭ mistero. Neniu sciis lian devenon, neniu konis liajn gepatrojn. Oni nur sciis ke dum la lastaj dek jaroj, de kiam li apenaŭ forlasis siajn infanajn vindaĵojn, li ĉirkaŭkuris la urbon, same kiel la multaj hundoj kiuj ĉirkaŭvagas la urbon kaj vivas per tio kion ili povas trovi.

Mende havis nenian hejmon, li dormis en la «Bes-midraŝ» <sup>(1)</sup> inter la granda brika forno kaj la muro. Kiel lupago por tiu dormejo li devis helpi al Duvid Jekil la Ŝamos <sup>(2)</sup> per la elbalaado de la «Bes-midraŝ» ĉiun nokton kaj la enporton de la akvo. Trifoje semajne li devis plenigi la du lignajn barelojn per akvo kiun li ĉerpis el la fonto staranta ekster la Sinagogo. La cetera tempo de la semajno estis tute lia propraĵo por fari en ĝi ĉion, kion li deziris, kaj dum tiu tempo li perlaboris sian vivrimedon.

Oni ofte trovis lin ĉe tiu aŭ alia bakisto enportantan la lignon en la bakejon por kio li ricevis pecegon da pano nigra. Por la legomvendistoj li portis la grandajn sakojn plenaĵojn je terpomoj kaj la korbojn kun frukto. Por tio li ricevis pomon, peron aŭ pli ofte bulbojn, tion li preferis. Nigra peco da pano kun nekuirita bulbo entrempita en salon tute sufiĉis por kontentigi la malsaton de Mende, kaj kiam lia apetito sopiris por io kuirita, li simple iris al la kuirejo de Reb Binem, la riĉulo de la urbo, kaj tie li ricevis, ŝanĝe de ia malgranda servo al la servistaro, ion kio restis post la manĝotablo de la familio, kion ĉiuokaze ili devis forĵeti.

La persono de Mende neniam mankis ĉe la diversaj edziĝofestoj, kiuj tiel ofte okazas en hebrea urbo. Ĉe tiaj okazoj, Mende staris ĉe la malfermita pordo aŭ fenestro kaj partoprenis en la frandaĵoj preparitaj por la gastoj. Fakte tiuj estis liaj plej bonaj horoj, li ĝuis, egale kun la gastoj, ne nur la bonan manĝon sed ankaŭ ilian festosenton kaj internan kontentecon. Tiam oni povis vidi lin, enrigardantan en la bone lumigitan salonon, kun malfermita buŝo, iom elstaranta lango, tiele enspiranta la spiriton de la festo kaj la ĝeneralan ĝojon de la dancantoj kaj de la ĝajecfarantoj.

Kvankam la bonkoraj hebreinoj kaj patrinoj de infanoj ĉiam ekĝemis pro kompato kiam li estis preterpasanta ilin, Mende mem neniam estis mal-

(1) Hebrea domo de studado de talmudo k. t. p.

(2) Servisto kaj administranto en la Sinagogo kaj en la Bes-midraŝ.

gaja. Senĉesa rideto ĉirkaŭludis lian buŝon, li ĉiam ŝajnis esti kontenta je sia sorto. Kaj kiam Duvid Jekil decidis unufoje ke Mende jam atingis sian dektri-jaran aĝon kaj estas jam tempo por li ke li preĝu ĉiumatene kun Filaktroj, kiel ĉiu alia hebreo, Mende sen mururo submetiĝis al la tiraneco de Duvid Jekil kiam tiu vindis la ledajn rimenojn firme ĉirkaŭ lian maldekstran brakon, kaj diktis al Mende la kutiman preĝon kiun Mende ripetis vorton post vorto : «Pro la unueco sankta, kiu estas benita en sia «restejo. En tremoj kaj kompatemo, por kunigi la nomon de Jud, hej kun «vuf, hej (1) en kompleta unuo... En nomo de tuta Izraelaro... Mi intencas per «la surmeto de la filaktroj, plenumi la ordonojn de mia kreanto kiu ordonis «al mi surmeti filaktrojn. Benita estu vi Jehova nia Dio! Reĝo de l' mondo «kiu sanktigis min per viaj ordonoj kaj ordonis surmeti filaktrojn».

Nelonge poste, Mende komencis senti, ke li estas viro, oni rimarkis, ke li ne plu volas obei tiel volonte, kiel antaŭe al ĉies ordonoj. Kiam li fine ricevis la oficon de torĉportisto antaŭ la edziĝoprocesioj, granda ŝanĝo sin montris en tuta vivo de Mende. De tempo al tempo li montris al diversaj personoj saketon en kiu tintis kelkaj moneroj. Tiujn-li diris-mi ŝparas por mia fariĝonta edzino, kaj efektive oni komencis vidi la ekvivon de romantikaj signoj ĉe lia persono.

Tiu mizera senhejma junulo, kiu ŝajne neniam kapablus pensi pri io alia krom sia mizera kaj kruda vivrimedo, subite povis trovi liberajn momentojn por amsentoj. Nekredebla fenomeno : Junulo kiu neniam en sia vivo spertis eĉ la plej etan komforton, dormis sur brikoj inter la forno kaj la muro, sciis nek dorlotadon de patrino, nek simpation de iu homa estaĵo, nek amikecon de kunvivantoj, subite eksentis sian propran koron kiu komencis fandiĝi antaŭ la kontraŭa sekso. La malpuraj ĉifonoj, kiuj ĉiam kovris lian korpon, iom post iom alprenis pli ordan kaj pli puran aspekton, oni komencis vidi novajn flikaĵojn sur la malnovaj truoj de liaj pantalonoj, lia kaftano kiu ĉiam sin tenis kune per ia ŝnuraĉo ĉirkaŭ lia talio, akiris al si kelkajn, kvamkam malsimilajn, butonojn.

Mende komencis partopreni en la disportado de la donacoj, frukto kaj nuksoj, dum la Purim-festoj (2), per tio li havigis al si multajn groŝojn. Antaŭe li tute ne kuraĝis peti tiun laboron, ĉar ĝi kutime estas rezervita por la respekta klaso de la malriĉa junularo en la urbo; kaj en la posta jaro oni eĉ trovis lin inter la maskitaj ludantoj kiuj ĉirkaŭiris la urbon dum la Purim-

(1) Jud. Hej. vuf. Hej. estas la akrostikoj de «Jehova» en hebrea lingvo.

(2) Dum la Purim-festoj la hebreoj havas kutimon sendi telereton da frukto kaj nuksoj al siaj amikoj, kiuj reciprokas la donacon per aliaj frandaĵoj. La junuloj kiuj portas tiujn donacojn ricevas por tio trinkmonon.

Alia kutimo dum tiuj festoj estas; junuloj alivestigas, reprezentantaj diversajn bibliajn karakterojn, kaj ĉirkaŭiras la urbon, kantas kaj dancas, kaj ricevas trinkmonon. En certaj hebreaĵ kvartaloj oni devenigas el tio la unuan teatran arton.

festoj de domo al domo. Tiam li iris sola, kvankam ĉiuj aliaj iris duope triope aŭ kvarope. Mende ne povis trovi kunulon, neniu el la aliaj junuloj ja vofis iri kun li. Lia kostumo kompreneble ne estis tre fantazia nek tro eleganta. Lia alivestiĝo simple konsistis el lia renversita surtuto, kies kolorigita substofa farigis la supraĵo, kaj anstataŭ masko li simple nigrigis sian vizagon per fulgo el la forno. Specialajn kantojn li ne havis, sed li sukcesis ele eklerni la sekvantan rimaron.

Ensaltas mi, Marioneto,  
Per mia nuda piedeto.  
Kaj tuj ĝi eksonoras,  
Ke malriĉeco floras.

Hodiaŭ estas Purim,  
Sed morgaŭ ne-plu festo.  
Do donu al mi groŝon  
Kaj min el ĵetu poste.

Tiun kanton li ripetis kun raŭka voĉo kaj per la sama tono en la domoj kiujn li vizitis kaj sendube lia saketo ŝveligis post la rondiro. Oni klare povis vidi en ĉio ĉi-tio la manon kaj konsilon de virino.

En malgranda mansardo, en la ligna dometo kiu staris apud la sinagogo, loĝis Mirel la kudristino. De kiam Ŝlojme, ŝia edzo, mortis, ŝi alprenis al sia profesio ankaŭ tiun de tombeja gvidistino. Kiam ŝia edzo, kiu estis la komunuma tombofosisto, ankoraŭ vivis, ŝi devis porti liajn manĝaĵojn ĉiutage al la tombejo kaj tiel ŝi akiris al si la konon de la tombaro. Nun, kiam la monatoj Tiŝra kaj Heŝvon alvenis, kaj, kiel estas kutime, multaj ortodoksaj hebreinoj komencas viziti la tombojn de siaj edzoj, gepatroj kaj de aliaj amataj personoj, ŝi akompanis ilin, anstataŭ ŝia mortinta edzo, kaj montris al ili la vojetojn kaj la plej bonan direkton por atingi la tombojn tra la vojetoj kiuj kutime estas kovritaj de arbetaroj kaj longaj sovaĝaj herboj sur ĉiuj hebreaj tombejoj. Tio helpis la enspezon, sed devigis ŝian foreston de hejmo, kie restis sola Maŝa, ŝia filino.

Maŝa estis malsaneta de post sia naskiĝo, kaj post la grava malsaniĝo ĉe sia dekvara jaro, ŝi neniam efike refortikiĝis. Ŝi ĉirkaŭiris kvazaŭ ombro, enhavis nenan brilecon en la okuloj, kaj ŝia longa malgrasa vizaĝo aspektis kiel tiu de vaksfiguro. Oni malofte vidis ŝin sur la stratoj, ŝi havis neniujn kunulinojn kaj pasigis siajn tagojn en la malgranda malhela mansardo, helpis kiom ŝi povis en la hejmo kaj eliris nur por alporti sitelon da akvo kiun ŝi ĉerpis el la fonto apud la sinagogo.

La najbarinoj babiladis ke ŝi perdis sian saĝecon unu vesperon kiam ŝi eliris al la fonto ne surhavante la antaŭtukon, kiu supozeble gardas hebreinojn kontraŭ malbonaj spiritoj, iu malbona spirito enflugis tiam ŝian korpon, kaj Dio scias kiam li forlasos la kompatindan knabinon.

Mende ofte helpis al ŝi eltiri la pezan akvoplenan sitelon el la fonto

kaj kelkfoje eĉ portis ĝin mem al ŝia mansardo. Unu tagon la knabino svenis apud la fonto kaj Mende ĝentile portis ŝin hejmen, sed tio nur estis farita en la krepusko, nerimarkita de iu en la urbo krom la patrino, kiu revenante de la tombejo renkontis ilin sur la ŝtuparo.

Estis longa tempo antaŭ ol iu povis diveni la influpovon, kiu staris malantaŭ Mende, kaj eble multaj jaroj ankoraŭ estus forpasintaj en tiu mistera situacio, se ne estus okazinta granda katastrofo kiu altrafis la malfeliĉan urbeton.

La terura epidemio, la ĥolero, jam regadis en la urbo dum pli ol ses semajnoj, ĝi faligis per sia falĉo la gejunulojn, la mezaĝulojn kaj la maljunulojn, ne restis domo, kiu ne perdis unu aŭ du, eĉ tri el siaj enloĝantoj, kaj la Rabeno kun ĉiuj piaj hebreoj jam provis ĉiun tradician rimedon kontraŭ la malbonaj spiritoj, kiuj supozeble invadis la urbon kaj kunportis la epidemion. Ili jam fastis ses tagojn de sunleviĝo ĝis sunsubiro. Ili jam eldiris are en la sinagogo la tutan psalmaron pli ol centfoje. Ili bruligis fojnejon plenan de fojno kiu staris en la ekstrema fino de la okcidenta flanko de la urbo. Ili eltiris dum unu nokto la digojn el fiŝlago en la suburbo kaj la tuta lago kun la fiŝaro malpleniĝis, sed la terura malsano ankoraŭ regis. Restis ankoraŭ nur unu rimedo, kiun oni devas provi. Por pacigi la forpasintajn animojn, estas necese festi edziĝon sur la tombejo. Sed kie oni povas trovi la paron, kiu konsentos esti edzigitata sur la tombejo?

Tiam la Rabeno alvokis Duvid Jekil Ŝamos kiu intime konis ĉiun junulon kaj junulinon en la urbo, por interkonsilo, kaj nelonge poste la mistera romano de Mende Narr konatiĝis tra la tuta urbo.

Tri tagojn post tiu interkonsilo, unu vesperon, post bela sunsubiĝo, granda amaso da gehebreoj direktis sin supren sur la monteton kaj kovris la tutan vojon, kiu kondukas al la hebrea tombejo ekster la urbo. Ĉe la supro de la procesio Duvid Jekil persone portis la edziĝotorĉon, post li marŝis la orkestro ludanta gaje edziĝomarŝon, poste sekvis la Rabeno, mem kondukanta apud si Mende Narr'n vestitan en tute nova kaftano kaj poste venis la Rabenedzino kun aliaj hebreinoj kondukantaj Maŝa'n la malspritan filinon de Mirel la kudristino, vestitan en blanka robo.

Kaj tie sur la tomboj de mortintaj hebreoj kaj hebreinoj, la romano de Mende Narr fariĝis vivanta realaĵo.

J. D. APPLEBAUM

Premiita en la VIIIaj Internaciaj Floraj Ludoj.



## Ama malkvieto

Nedifinebla malkviet'  
loĝas en mi ĉiun momenton;  
neeble scii pri l' sekret'  
esprimi klare mian senton.

Kiam aspektas ĝi dolor',  
invadas min melankolio;  
kiam ĝi estas ĝoja glor',  
ĉirkaŭ mi flosas poezio.

Tiela estas ĝia ĉarm'  
kiel sonor' de bela kanto,  
kiel amika, frata varm',  
kiel parfumo de dianto.

Pro ĝia fido kaj esper'  
mia rigard' estas serena,  
miaj malsanoj sen sufer'  
kaj mia vivo pacoplana.

Kaj tiu sent' revigas min  
pri fantaziaj ampromesoj  
kvazaŭ prononcus amatin'  
vortojn por mi kiel karesoj.

Tiam min gvidas tra la voj',  
de belulino la rigardo;  
kaj estas Amo mia ĝoj',  
de mia viv' hela standardo!

JAUME GRAU

## Idilio



ERE, al mi diras Paradis mia kunmarŝanto, vi kredos al mi se vi volas, sed mi estas dolorigita, mi estas venkita... Neniam ankoraŭ marŝo lacigis min kiel tiu ĉi.

Li trenis la piedon kaj klinis en la vespero sian buston kvadratan embarasatan per sako, kies komplika, plilongigita profilo kaj alteco ŝajnis fantaziaj. Du fojojn li ekbatis kaj preskaŭ falis.

Paradis estas hardita. Sed li kuris la tutan nokton en la tranĉeo kiel komunikanto dum la ceteraj dormadis, kaj li pravis senti sin lacompita.

Tial li grumblis :

— Nu? Ili estas el kaŭĉuko, tiuj kilometroj, alie estas neeble.

Kaj per renbato li subite relevis sian sakon ĉiujn tri paŝojn, kaj tio pezis kaj li spiregis, kaj la tutaĵo kiun li konsistigis kun siaj pakajoj ŝanceliĝis kaj ĝemis kvazaŭ malnova troŝargita ŝalupo.

— Oni alvenas, diris iu oficiro.

La oficiroj diras tion ĉiam, ĉiuokaze. Tamen, — malgraŭ tiu diro de la oficiro, — oni alvenis, ja, en la vesperan vilaĝon, kie la domoj aspektis kvazaŭ desegnitaj per kreto kaj per nedelikataj inkostrekoj sur la bluita papero de l' ĉielo, kaj kie la nigra silueto de l' preĝejo, — kun pinta sonorilejo, ornamita de du pli delikataj kaj pli pintaj turetoj, — estis tiu de granda cipreso.

Sed, kiam li eniras en la vilaĝon kie li devas loĝiĝi, la soldato ne elfinis ankoraŭ sian penadon. Malofte la eskadro aŭ sekcio sukcesas loĝiĝi en la loko al ili destinita : malkomprenoj kaj duoblaj okupoj, kiuj implikiĝas kaj ordiĝas sur la loko mem, kaj nur post kelkaj horkvaronoj de malkvieteco ĉiu estas direktata al sia definitiva provizora kuŝejo.

Ni estis do, post la kutimaj vagadoj, akceptataj en nia nokta kantonmento : hangaro subtenata per kvar fostoj kaj kiel murojn havanta la kvar kardinalajn punktojn. Sed tiu hangaro estis komforte kovrita : estiminda cirkonstanco. Ĝi estis jam okupata per kariolo kaj plugilo, apud kiuj oni sin lokis. Paradis kiu ne ĉesadis malbeni kaj ĝemi dum la tempo de piedbaraktado kaj de iroj kaj venoj, forĵetis sian sakon, poste li mem sin ĵetis teren, kaj tie restis kelkan tempon, tede, plendante ke liaj membroj estis ellacigitaj kaj ke la plando de liaj piedoj dolorigis lin; kaj ĉiuj liaj artikoj ankaŭ.

Sed jen la domo al kiu apartenis la hangaro, kaj kiu ĝuste antaŭ niaj okuloj staris, eklumiĝis. Nenio tiel logas la soldaton kiel, en la unutona grizeco de l' vespero, fenestro post kiu brilas la stelo de lampo.

— Se oni farus promenadon! proponis Volpatte.

— Ja, bone, diris Paradis.

Li sublevas sin, ekstaras. Lamante de laciĝo, li turnas sin al la orumita fenestro kiu elmontris sin en la ombro; poste al la pordo.

Volpatte lin sekvas kaj mi venas poste.

Oni eniras, kaj oni demandas al la maljuna bonulo kiu malfermis al ni kaj kiu prezentas palpebrumantan kapon, eluzitan kiel malnova ĉapelo, ĉu li havas vinon por vendo.

— Ne, respondas la maljunulo skuante sian kranion en kiu puŝas kelkloke pecoj de blanka lanugo.

— Ĉu ankaŭ ne bieron, kafon? ion ajn, nu...

— Ne, miaj amikoj, tute nenion. Oni ne estas de tie ĉi, oni estas rifugiintoj, vi scias...

— Do, ĉar nenio estas, ni foriru.

Oni turniĝas. Tamen, dum momento, oni profitis ja la varmon kiu regas en la ĉambro, kaj la vidon de la lampo... Jam Volpatte atingis la sojlon kaj lia dorso malaperas en la malhelo.

Tamen, mi ekvidas maljunulinon, kurbiĝintan funde de seĝo, en la alia angulo de l' kuirejo kaj kiu ŝajnas tre okupata pri laboro.

Mi pinĉas la brakon de Paradis.

— Jen la belulino de l' loĝejo. Iru ŝin amindumi. Paradis havas belegan geston de indiferenteco. Li malŝatas ja ĉiujn virinojn, de post jaro kaj duono kiam ĉiuj de li ekviditaj ne estas por li. Tamen, eĉ se ili estus por li, li ankaŭ ne interesiĝas pri ili.

— Juna aŭ maljuna, *peuh!* li diras al mi ekoscedante.

Pro senokupo, pro maldiligento foriri, li iras al la bona virino.

— Bonan vesperon, avino, murmuris li eloscedante.

— Bonan vesperon, miaj infanoj, singultas la maljunulino.

Proksime, oni vidas ŝin detale. Ŝi estas sulkgita, kuntirita kaj faldita sur siaj maljunaj ostoj kaj ŝi havas la vizaĝon blanka kiel horloĝplato.

Kaj kion ŝi faras? Lokite inter sia seĝo kaj la rando de l' tablo ŝi klopodas purigi ŝuojn. Ĝi estas granda tasko por ŝiaj infanaj manoj: ŝiaj gestoj ne estas firmaj kaj kelkafoje ŝi flankenĵetas broŝbaton; kaj ankoraŭ, la ŝuoj estas tre malpuraj.

Vidante ke oni ŝin rigardadas, ŝi murmuris al ni ke ŝi devas bone ciri, ankoraŭ en tiu ĉi vespero, la ŝuojn de sia filineto, kiu estas modistino en la urbo, kaj tien devas iri matene.

Paradis sin klinis por pli bone atenti la ŝuojn, kaj subite, li etendas la manon al ili.

— Lasu tion, avino, mi ilin briligos en tri minutoj, la etajn ŝuojn de via juna filino.

La maljunulino faras neajn signojn, skuante sian kapon kaj siajn ŝultrojn.

Sed mia Paradis prenas autoritate la ŝuojn, dum la avino, senmovigita de sia malforteco, malkvietiĝas kaj montras al ni fantomon de protesto.



Li kaptis ŝuon per ĉiu mano, tenas ilin milde kaj ilin dum momento rigardadas, kaj eĉ oni dirus ke li iomete kunpremas ilin.

— Kiom malgrandaj ili estas! diras li kun voĉo kiu ne estas la ordinara voĉo kiun li uzas kun ni.

Li ankaŭ prenis al si la brosojn, kaj ekfrotas kun ardeco kaj kun zorgo, kaj mi vidas kiel, la okuloj fiksitaj sur sia tasko, li ridetas.

Poste, kiam la koto estas forviŝita de la ŝuoj, li prenas ciraĵon per la pinto de la duobla broso, kaj kun ĝi, tre atente, karesas ilin.

La ŝuoj estas delikataj. Ili estas certe ŝuoj de juna koketulino: vico de butonetoj tie brilas.

— Eĉ unu butono ne mankas, li flustras al mi, kaj fierecon oni sentas en lia akcento.

Li jam ne havas dormemon, li ne plu oscedas. Kontraŭe, liaj lipoj estas kunpremitaj; juna kaj printempa radio heligas lian fizionomion, kaj pri li, kiu iris dormi, oni dirus ke li ĵus vekigis.

Kaj li promeniĝas siajn fingrojn, kie la ciraĵo metis belan nigron, sur la ŝukruo, kiu plilargiĝante supre, elmontras iomete la formon de la malsupra kruro. Liaj fingroj, tiel lertaj por cirado, havas tamen iom da mallerteco, dum li turnas kaj returnas la ŝuojn, kaj kiam li alridetas ilin, kaj kiam li pensadas — profunde, malproksimen, — kaj kiam la maljunulino levas la brakojn en l' aero kaj prenas min kiel atestanton.

— Jen estas tre servema soldato!

Finiĝis. La ŝuoj estas ciritaj, kaj poluritaj. Ili rebrilas. Nenio por fari...

Li metas ilin sur la bordon de la tablo, kun granda atento, kvazaŭ ili estus sanktaĵoj; poste, fine, li deapartigas siajn manojn.

Li ne tuj formetas de ili siajn okulojn, li rigardas ilin, poste, mallevante la nazon, rigardas siajn proprajn botojn. Mi memoras ke farante tiun komparon, tiu granda junulo kun destino de heroo, de vagulo kaj de monaĥo, ridetis ankoraŭ unu fojon kun tuta sia koro.

... La maljunulino malkvietiĝis en la fundo de sia seĝo. Ŝi havis ideon.

— Mi iras ĝin diri al ŝi! Ŝi dankos vin, sinjoro. Nu! Jozefino! ŝi vokis turniĝante en direkto al iu pordo kiu tie staris.

Sed Paradis haltigis ŝin per larĝa gesto kiun mi trovis belega.

— Ne. Ĝi ne valoras la penon, avino, lasu ŝin kie ŝi estas. Ni estas ĉiam preterpasantoj. Ĝi ne valoras la penon, nu!

Li tiel forte pensis kion li diris ke lia akcento estis aŭtoritata, kaj la maljunulino, obeema, senmoviĝis kaj silentis. Ni ekiris kuŝiĝi sub la hangaro, inter la brakoj de l' plugilo kiu atendis nin.

Kaj tiam Paradis denove ekoscedis, sed, en la lumo de kandelo, en la bestmangujo, longan tempon poste, oni rimarkis ankoraŭ sur lia vizaĝo feliĉan rideton.

HENRY BARBUSSE

El franca lingvo tradukis

MARIAN SOLĂ

## Al Vi!

Pompas printempo...  
 Odor' de l' floroj ŝvebas nun.  
 Regas mallumo,  
 ĉar kaŝis sin la pala lun'.  
 Brilas lampiroj  
 en mola musko sub rozuj'...  
 Mia amata!  
 Ne timu do, sed venu tuj!

Noktan silenton  
 ekrompos nur batad' de l' kor'...  
 Spirojn de l' lipoj  
 la ventogemo portos for.  
 Sonoj mistikaj  
 de l' nokto kaj de mia sin',  
 mia amata,  
 al sorĉa sonĝo lulos vin!

Amo Vin vokas!  
 Atendas nin benketo jam...  
 Por kordoloro  
 nur amo estas la balzam'.  
 Por vin ornamo  
 per brila gem' de diadem',  
 mia amata,  
 donacos mi la koron mem.

Venu rapide!  
 Soifas mi je kisoj cent!  
 Ni ebriiĝu  
 el vino de plej sankta sent'!  
 Kaj por ne vivi  
 en tera marĉo de l' envi',  
 mia amata,  
 ĉielon havos mi en Vi!

JULIO BAGHY

## ENLANDA MOVADO

Iom post iom la enlanda movado refortiĝas. Sciigojn pri esperantaj aferoj ni ricevas de ĉie. Ni agrable konstatis ke la ĉeestintoj al la Kongreso vekas denove en siaj lokoj la esperantan fervoron.

GIRONA. — La sidejo de la grupo «Ĝirona Espero» estas definitive ĉe la urbdomo. En ĝi oni malfermis kun granda sukceso kurson de Esperanto, kiu estas depost Oktobro daŭre ĉeestata.

En la grupo «Studenta Juneco» instruas ankaŭ nian lingvon samideanoj Font kaj Costa. Estas pli ol 30 lernantoj, ĉiuj studentoj aŭ instruistoj.

Ĵurnalo «El Autonomista» reproduktis la artikolon de D-ro Bremón, aperintan sur *Kataluna Esperantisto*, «Nur ni esperantistoj estas pravaj». Tiu ĵurnalo konstante raportas pri la disvolviĝo de Esperanto tra la mondo. Ĝi distingiĝis ankaŭ en la raportado pri nia lasta Kongreso.

MANRESA. — Sur la ĵurnaloj «Patria» kaj «Diario de Avisos» aperis gravaj artikoloj pri la decido de la Girona Kongreso efektiviĝi la venontan en Manresa kaj la tieaj gesamideanoj jam de nun sin pretigas al ĝia organizo sub la lerta gvidado de la malnova samideano Albagés.

Baldaŭ oni solenigos la fondiĝon de la nova grupo «Bela Espero» per propaganda mitingo. La grupo kalkulas jam 40 membrojn kaj komencis kurson. Alia kurso komenciĝis speciala por fraŭlinoj.

BARCELONA. — Depost la unuaj tagoj de Oktobro funkcias regule kursoj de Esperanto en la jenaj Grupoj :

«Nova Sento».	Elementa kurso.	Profesoro :	S-ro Bolós.
»	»	Supera kurso.	» S-ro Gil.
«Paco kaj Amo».	Elementa kurso.	»	S-ro Bohigas.
»	»	Supera kurso.	» S-ro Alberich.
«Barcelona Stelo».	Elementa kurso.	»	S-ro Durà.
»	»	Supera kurso.	» S-ro Domènech.
«Esp. Kantistoj».	Ĝenerala kurso.	»	S-ro Gumà.

«La Rondo».	Ĝenerala kurso.	»	S-ro Montserrat.
«Semo» A. E. P.	Elementa kurso.	»	S-ro Guardiet.
»	Supera kurso.	»	S-ro Grau.

— La grupo «La Rondo» aranĝis en Oktobro esperantan feston, dum kiu estis ludata la kataluna-esperanta komedio «Vivu Esperanto». Per la profitoj kiujn la sukcesa festo havigis, la grupo eldonis propagandan broŝuron «Pro Esperanto», kun gramatika resumo de Pujulà i Vallès.

La organizintoj, kiujn ni gratulas pro ilia sukceso, havis la afablecon rezervi loĝion por la Komitato de K. E. F. Ĉeestis kelkaj komitatanoj akompanante la aŭstralian samideanon S-ron Hudson, kaj la Prezidanto de K. E. F. S-ro Gili Norda estis petata diri kelkajn vortojn je la fino de la festo.

— «La Veu de Catalunya» aperigis bonegan artikolon de samideano Romà Guardiet, pri Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj, kun detaloj eltiritaj de la revuo «Nova Tagiĝo.» Sur la sama ĵurnalo aperis ankaŭ kelkaj interesaj raportoj de «Internacia Esperanto Servo.»

PALAFRUGELL. — «Baix Empordà» publikigis raporton pri nia Kongreso en Girona, kun komentarioj pri ĝia sukceso kaj la antaŭeniĝo de la esperanta movado.

TERRASSA. — Funkcias kursoj en la grupo «Lumon» kaj en la societoj «Centre Autonomista de Dependents» kaj «Juventud Tarrasense».

La citita grupo eldonis propagandan folion «Terrassa-Esperanto» kun tre bone elektita teksto.

Vizitis la urbon la aŭstralia samideano Hudson kaj oni regalis lin per intima lunĉo kaj agrabla esperanta festeto.

SABADELL. — Esperantista Societo «Aplec» malfermis novajn kursojn kaj regule organizas ekskursojn kaj vizitojn por komuna ekzercado.

Ankaŭ veturis ĉi tien S-ro Hudson, kiu vizitis detale kelkajn fabrikejojn, povante per tio konstati la grandan industriemon de la urbo kaj la escepte grandan disvastigon kiun en ĝi atingis Esperanto.

LLEIDA. — Kelkaj samideanoj klopodas restarigi la grupon

«Ilerda Espero». El ili, S-ro Abadal jam aranĝis kurson kun plena sukceso.

VALENCIA. — En la grava «Centro Dom Bosco» (Escuelas Salesianas) faris publikan paroladon samideano Artur Domènech, el Barcelona, klarigante la celon de Esperanto kaj montrante la bonon kiun ĝi povas alporti al la internaciaj katolikaj organizaĵoj. Lia bonega parolado estis atente aŭskultata kaj je ĝia fino enskribiĝis multaj ĉeestantoj por la malfermota kurso.

La Instituto de Idiomoj (Valencia Universitato) akceptis enkonduki la instruadon de Esperanto.

PALMA DE MALLORCA. — Esperantista Klubo «Palma» komencis tre sukcese tri kursojn. Unu el ili estas speciala por infanoj. Klarigas ilin S-roj S. Ginard, M. Ribas kaj G. Alomar.




---

## Nekrologio

La aŭstra infanino Edith Haas, kiun la esperantista komitato «Por Aŭstraj infanoj» venigis en Hispanujon, mortis je la unuaj tagoj de lasta Decembro en Zaragoza, en la hejmo de S-ro Gastón, Prezidanto de la dirita komitato.

Dum la Aŭgusta monato ŝi estis vizitata de sia patrino, pro la malsano kiu estis detranĉonta ŝian vivon.

Al ŝia familio, al la aŭstraj gesamideanoj kaj al la porinfana Komitato ni prezentas niajn sincerajn kondolencojn.

— Subite mortis en Decembro la malnova samideano S-ro Antoni Leonor, unu el la fondintoj de la grupo «Semo» el Barcelona kaj entuziasma batalanto. Al lia edzino kaj filinoj, samideanoj Angelina kaj Concepció, ni prezentas niajn kondolencojn.

---

## XIV<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto en Helsinki (Finnlando)

6 - 12 Aŭgusto 1922

La Finnlanda esperantistaro, tuj post la elekto de la urbo Helsinki por la XIV<sup>a</sup> Universala Kongreso, firme laboras por ĝia plej brila sukceso. Ĝis nun aperis la unua kaj dua komunikoj, kiujn, pro ilia tro granda amplekso, ni kun bedaŭro ne povas presigi.

La Loka Kongresa Komitato sendis al ni kvanton da aliĝiloj al la XIV<sup>a</sup> kiujn ni dissendas kun tiu ĉi numero de K. E. al ĉiuj legantoj.

Ni petas plej rapidan aliĝon al tiuj, kiuj intencas partopreni la Kongreson, por faciligi la taskojn de la organizantoj. Sur la aliĝilo oni trovas ĉiajn necesajn detalojn kaj la L. K. K. promesas sendi ĉiujn aperintajn kaj aperontajn Komunikojn al la aliĝintoj.

Jen la ĉefaj detaloj elĉerpitaj el la ricevitaj komunikoj:

**ADRESO** : La oficiala poŝta adreso de la Kongresa Komitato estas : XIV<sup>a</sup> Kongreso de Esperanto - HELSINKI (aŭ Helsingfors) Finnlando.

**ALIĜO** : Oni petas kiel eble plej rapidan aliĝon de la tutmonda esperantistaro. Kotizo montrita sur la aliĝilo. 38 samideanoj jam sendis siajn aliĝojn.

**ALVOKO** : Laŭ iniciato de la Loka Kongresa Komitato, 20 finnaj eminentuloj subskribis gravan alvokon publikigitan en la tiea gazetaro, petante laŭpovan subtenon al la esperantistoj en ilia respondeca laboro por la XIV<sup>a</sup> Kongreso de Esperanto. La alvoko tre bone efikis.

**KONGRESA BANKO** : Laŭ interkonsento kun la L. K. K. ĝi estas: «Osakepakki Ulkomaankauppaa varten» en Helsinki.

**KONGRESAJ PROPAGANDILOJ** : Oni eldonos kongresajn afiŝojn, kongresajn poŝtkartojn, kaj glumarkojn. Prezoj montrataj sur la tabelo de la aliĝilo.

**EKSKURSOJ KAJ FESTOJ** : Oni nun pristudas la okazigon de tiuj solenaĵoj por allogi la fremdajn esperantistojn.

EN LA PROKSIMA NUMERO

**ROBERTO, REĜO DE SICILIO**

poemo de Longfellow, trad. Louise Briggs.

## ESPERANTAJ GAZETOJ

ricevitaj en nia Redakcio, publike legeblaj ĉe la legoĉambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

Franca Esperantisto	Nova Tempo
Le Monde Espérantiste	Literaturo
Esperanto-Praktiko	Bulgara Esperantisto
Belga Esperantisto	La Patrje Ladine
La Marto	The British Esperantist
La Semisto	Nederlanda Esperanto
Germana Esperantisto	La Verda Ombro
Hispana Esperantisto	Amerika Esperantisto
Katolika Mondo	Espero Teozofia
Esperantista Laboristo	L'Esperanto
Kristana Espero	La Revuo Orienta
Verda Utopio	Arguso
Vegetarano	Brazila Esperantisto
Esperanta Finnlando	Oficiala Gazeto Esperantista
La Esperantisto	Ĉeĥoslovaka Gazeto
La Laborista Esperantisto	Nova Eŭropo
Nova Tagiĝo	La XIII <sup>a</sup>
Hungara Esperantisto	Agitanto
Esperanto Triumfonta	Bizantio
Esperanto (U. E. A.)	La Espero
Internacia Pedagogia Revuo	


Ni dankos sendadon de la ceteraj esperantaj gazetoj.

---

## AVIS

Per a facilitar la nostra tasca, preguem a tots els federats vulguin pagar la quota sense cap ajornament, en començar l'any.

Els esperantistes isolats poden remetre'ns l'import directament en segells de correu.



# LEIPZIG-A SPECIMENFOIRO

FOIRO

POR TEKNIKO KAJ KONSTRUKTAKO

Printempa Foiro 1922 de la 5<sup>a</sup> ĝis 11<sup>a</sup> de marto

Aŭtuna Foiro 1922 de la 27<sup>a</sup> de aŭgusto ĝis 2<sup>a</sup> de septembro

*La centra merkato por la internacia  
komerco kaj ofertado*

*Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj*

*Informojn donas kaj aliĝojn akceptas*

MESSE AMT FÜR DIE MUSTERMESSEN  
IN LEIPZIG

(Foiroficejo por la Specimenfoiroj en Leipzig)